de la lumo) li skribis pri la neceso de universala lingvo kaj en *Panglottia* li pridiskutis la dezirindajn ecojn de nova lingvo.

La emblemo de la akademio devenas de la ornamita tenilo de vikinga glavo. La cirklo reprezentas la mondon. La fonda kunsido adoptis la figuron kun la sentenco *Integro tutmonda* kiel simbolon por la Akademio Comenius.

**Neergaard agas por la fondo de Akademio Comenius**

En letero de 1985 10 07 Paul Neergaard konstatis ke la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS) "kiel jure difinite, estas universitato, kvankam sub la nomo de Akademio". "Pluraj membroj de AIS diskutis la dezirindecon fondi Akademion en la internacia, konvencia, prestiĝa senco de tiu nocio kaj laŭ interkonsento inter pluraj membroj de AIS, inter kiuj Profesoro D-ro Helmar Frank, rezultis la propono pri fondo de tia internacia akademio sub la nomo *Akademio Internacia de Sciencoj Comenius* (por marki la diferencon disde AIS)."

Neergaard kunsendis kun sia letero de 1985 10 07 "Proponon pri Statuto (ellaborita en jura interkonsiliĝo kun Profesoro D-ro Ivo Lapenna)", kaj proponon pri fondaj membroj de la akademio. La statutpropono distingas inter "baza kategorio" (difinita per tio ke ties membroj jam membras en iu nacia akademio) kaj "aldona kategorio" (nemembroj de naciaj akademioj). En la baza kategorio Neergaard proponis dek ses jamajn membrojn de AIS kaj dek kvar nemembrojn de AIS. En la aldona kategorio li proponis naŭ, do entute tridek naŭ. La maksimuma nombro de membroj estu okdek.

La propono pri statuto de oktobro 1985 detale priskribis la funkciadon de la akademio kaj la manieron alelekti novajn membrojn.

**La fonda kunsido**

En letero de 1986 03 06 Neergaard invitis al fonda kunsido en Kopenhago, kiu estis okazonta la 19-an de aprilo je la 14-a horo en la Sempatologia Instituto por Evolulandoj, Ryvangs allé 78 (la iama laborejo de Neergaard). En letero de 1986 03 24 li ŝanĝis la daton al la 12-a de aprilo, samhore kaj samloke.

Estis aliĝintaj al tiu kunsido sep personoj, Stojan Ĝuĝev, Helmar Frank, Paul Kustaanheimo, Ivo Lapenna, Paul Neergaard, Stanley Nisbet kaj Olav Reiersøl, sed fakte ĉeestis - pro plej diversspecaj malhelpoj - nur tri: Kustaanheimo, Lapenna kaj Neergaard.

Oni decidis pri statuto kaj regularo. Kun malmultaj ŝanĝoj oni aprobis la statutproponon de Neergaard, ellaboritan en 1985. Aldoniĝis Regularo por Voĉdonoj proponita de Lapenna. La nomo estis fiksita al *Internacia Scienca Akademio Comenius*. La nombro de fondaj membroj estis dudek sep, sed oni